

Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista

Aperas ĉiumonate



Redakcia Sekretario :
H. Van Durme
Eggestraat, 21
Mortsel

Administranto :
Gerard Debrouwere
Marckesteeweg, 18
Kortrijk



Jara abonprezo : 15 frankoj. — Eksterlando : 4 belgoj
Por membroj de «Flandra Ligo Esperantista» senpage
Poŝtĉeko : 2321.50 de Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk.

FLANDRA ESPERANTISTO
deziras ĉian bonon al ĉiuj
siaj legantoj kaj kunlaborantoj
okaze de Novjaro.

Sub signo de la nova Jaro.

1933 foriras... 1934 alvenas...

Sed restas la Krizo.

Krizo ekonomia, krizo politika, krizo en la ligo de Nacioj, krizo konstanta kaj tutmonda.

Ankaŭ krizo en Flandrujo...

Neniam oni tiom parolis pri paco... kaj pensis pri milito. Oni konferencas por senarmigado... kaj neniam oni tiel vigle fabrikis kanonojn, gasojn kaj ĉiuspecajn mortigilojn.

Preskaŭ malespere ni regardas la haoson... Kio estos la fino?

En la nigra ĉielo nur brilas malgranda steleto, verda steleto, la signo de l'Espero, la insigno de Esperanto.

Esperantistoj devas esperi.

Vidi en sia proksimulo nur homon kaj fraton, tiel komprenis nia majstro Zamenhof mem la celon de sia, de nia agado.

Flandraj Esperantistoj, ni ne forgesu tiun grandan veron! Tia estu nia vivocelo kiel Esperantistoj.

Esperanto, kvankam ne ankoraŭ sub ĉiuj vidpunktoj de praktika utilo, pravas al ni, ke internacia interkompreno ne estas utopio.

Ĉu vi jam korespondis kun eksterlandaj samideanoj?

Se ne, ekkorespondu!

Se jes, tiam vi certe scias, kiel jam depost la unua letero vera frateco ekregas inter la gekorespondantoj, ĉu ili estas de diversaj nacioj aŭ de diversaj lingvoj, ĉu ili apartenas al diversaj religiaj aŭ mondkonceptoj.

Per esperanta korrespondado ni lernas, ke vere en ĉiuj landoj, trans ĉiuj maroj, sin trovas homoj, kiuj kiel ni volas pacon, interfratiĝadon de la popoloj.

Ni travivas la naskiĝepokon de nova tempo. Tamen rekte la kapoj! Alte la koroj! Kio estas jaro, kio estas jardeko en la historio de l'homaro?

Nu, kio estas nia devo kiel Esperantistoj en tia epoko?

Kaj ĉi tie ni speciale volas atingi tiujn samideanojn, kiuj iĝis kvazaŭ indiferentuloj por la movado, kiuj neniam plu ĉeestas la kunvenojn, sed ni esperas, almenaŭ legas sian organon...

Ni volas trafi viajn korojn!

Se vere en vi restas ĝermoj de la bela ideo, kiu iĝis de vi Esperantisto; se vere via koro ankaŭ povas bati por noblaj aferoj, tiam vi devas kompreni, ke malgraŭ ĉio estas **devo** por vi, kunbatali por la paco. La paca epoko certe venos, kiam la homaro vere estos matura por ĝi. Ni, Esperantistoj, povas plifruigi la maturiĝadon.

Malgraŭ indiferenteco de la homamaso, de la landestraroj; malgraŭ la militemaj krioj de tiuj, kiuj ne ŝajnas kompreni kiel freneza estos nova milito; meze de la haoso, ankaŭ en Flandrujo, grupiĝu la samideanoj ĉirkaŭ la standardo de Flandra Ligo Esperantista. Fortigu vian organon «Flandra Esperantisto», por ke en nia lando ni povu antaŭenpuŝi tiun agadon.

Vivu esperante! korespondu! Restu en konstanta kontakto kun via loka grupo. Ofere almenaŭ tiun horon semajnan de via libertempo, por ke via grupo ne estu papera listo, ne estu oficiraro sen soldatoj.

Propagandu niajn ideojn en pacemaj rondoj kaj montru kiel internacia vivo, kiel interpopola, intergenta fratiĝado efektive preskaŭ ne estas ebla sen neŭtrala, sendependa lingvo.

Unuvorte, estu vera, fervora Esperantisto!

Tion ni deziras al vi ĉiuj, samideanoj, je la komenciĝo de la nova jaro.

Pol Varens.

Rezolucio por vere internacia Esperanto

Unuanime akceptita de la 21a Japana Esperanto Kongreso en Kioto, la 3an de novembro 1933.

«La 21a Japana Esperanto Kongreso atentigas pri la reformemo kaj troa neologismemo de «modernaj» Esperantistoj, kiuj konstante malfaciligas nian Internacian Lingvon. Tro ofte oni ne atentigas nin orientanojn ĉe la enkonduko de «internaciaj vortoj», kiuj ne estas komprenataj en la Oriento, same kiel en multaj eŭropaj landoj.

Nia majstro Zamenhof neniam parolis pri Esperanto kiel «la eŭropa lingvo» sed ĉiam kiel la lingvo «de l'tuta Homaro». La ja-

pana Esperantistaro konstatas, ke se la opinio pri Esperanto kiel «la eŭropa lingvo» estus alprenata de la plimulto de niaj eŭropaj samideanoj, la disvastiĝo de nia lingvo en la Oriento estus grave endanĝerigata.

Konsiderante tiun ĉi aferstaton, la 21a Japana Esperanto Kongreso deklaras, ke

1° La vortfarado per afiksoj kaj kunmetado estas unu el la esencaj karakterizoj de Esperanto; ĝi estas grava plifaciligado de la lernado;

2° La ofico de la lingvo mem kuŝas en ĝia manifestado, kiu realigas ĉefe en la literaturo; konsekvence, fako speciale nomata literaturo en Esperanto ne povas ekzisti kaj oni ne povas formi alian fakan vortaron literaturan, kiel, ekz., maŝinfakan, medicinan, aŭ alian terminaron. Tion ĉi ni asertas spite al la sofismoj de anoj de la tielnomata «literatura fako».

3° Neologismoj pro bezono de poemfabrikado estas nenio alia ol la degenerado de la arto poezia; plie, en Esperanto ĝi signifas rekte dangeran ludon kontraŭ la Fundamento.

Konsiderante, ke ni ekstrem-orientanoj povas fari pli objektivan juĝon pri la internacieco ol la eŭropanoj kies lingvoj estas tro proksimaj al Esperanto kaj gardi severan senpartiecon kaj neŭtralecon, ni, kunvenintaj en la Laborakunsido de la 21-a. Japana Esperanto Kongreso en KIOTO, energie malrekomendas, pro la bono de nia lingvo, la uzon de neologismoj sen nuanca diferenco aŭ kun perforta nuancigo.

Ni vokas al niaj samideanoj en la Okcidento: la epoko de eŭropa aŭ ali-kontinenta ideo imperialismo jam definitive pasis. Vivu la tuthomara solidareco kaj la inter-kontinenta lingvo Esperanto! Vivu ankaŭ la egaleco de rajtoj de ĉiuj popoloj ankaŭ sur la lingva kampo internacia!»

Mondliteraturo.

ANTAŬPAROLO

Rolando, Reĝo Artur kaj la Cid'o estas la tri herooj pri kiuj plej oni verkis; sed el la tri, la unua estas tiu pri kiu la legendoj pli malsimilas unu al alia.

La fakto estas, ke reĝo Karolo la Granda, aŭ por pli prave paroli, lia nevo Rolando, estis venkita pasante la Pirinean montaron: (red. — de kiuj? —) Tie disiĝas legendoj: laŭ la hispanaj kantoj de **Bernardo del Carpio**; laŭ la francaj, de Zaragozaj Mahomedanoj.

Tamen, loĝas ĉe la montaro mistera popolo, de nekonata deveno, inter kies kantoj, oni konservas la jenan, temanta pri la batalo. Atesto de okulvidanto pli valoras ol kiu ajn. Ĉu la rakonto de la Eŭskaroj aŭ Baskoj mem, loĝantoj de la Altobizkara montkolo (apud Roncesvalles aŭ Roncesvaux) ne estus la plej preciza?

Tiu malgranda verko povas enhavi grandan intereson laŭ etnografia kaj historia vidpunktoj. Do, mi profitas la afablan akcepton de ĉi tiu simpatia revuo por konatigi al la mondo, pere de Esperanto, malmulte konatan verkon de malmulte konata raso.

La Tradukintino.

La Altobizkara kanto.

(Altobizkarko kantua)

I

Eliris forta krio
el mezo de l'montaroj Eŭskalandaj.
Dommastro, antaŭ pord' de sia domo,
aŭskultas kaj demandas:
He! Kiu estas tie? Kion volas?
Dormanta hund' ĉe la piedoj mastraj
restaras kaj pleniĝas per la bojo
la land' Altobiskara

II

Al Ibaneta monto bru' alvenas,
ĝi proksimiĝas kvazaŭ trairanta
serpento inter ŝtonoj, plenbloviĝas
armea bruo, malproksimvenanta.
Trumpetojn ludas vaskoj sur montpintoj.
Akriĝas la dommastr' la pintojn sagajn.

III

Alvenas jam, alvenas jam la homoj.
Ĝi estas kvazaŭ lancarbaro vasta,
multekoloraj flagoj flirtas meze
kaj fulmoj el l'armiloj hele saltas.
— Kiom da ili estas, knab', kalkulu
Vi bone: — Unu, du tri, kvar, kvin, ses,
sep, ok, naŭ, dek, dekunu, dekdu, dektri,
eĉ, dekvar, dekkvin, deksex, deksep, dekok
kaj deknaŭ, dudek kaj ankoraŭ miloj.
Je la kalkul' la tempon ni malŝparas.

IV

Kunigu ni fortikajn brakojn niajn,
elfunde ŝiru la ŝtonegojn kalkajn,
malsupren ilin ĵetu el la monto
sur kapojn malamikajn malamatajn.
Ni ilin dispremigu.
Ni ilin tuj delasu mortfrapataj.

V

Ĉi tiuj nordaj viroj kion serĉas
ĉe la montaroj niaj patrolandaj?
La pacon kial ili tiel rompas?

La montojn faris la Sinjoro Alta
por ke la homoj tien ne trapasu...
Sed ŝtonoj rulas sur almlilitantajn
soldatojn, sangtorentoj valen kuras
Kiom da ostoj pulve rompiĝintajn!
Kaj kia maro sanga!

VI

Forkuru tuj, forkuru tiuj, kiuj
ankoraŭ forton kaj ĉevalon havas.
Forkuru, reĝo Karlo la Grandega,
je nigra plumo kaj mantel' ruĝfajra!
Sur valo kuŝas morta,
kuŝas Roland', de Vi la nev' amata
Eŭskaroj, ni malsupreniru valen,
sagfrapante fremdulojn forkurantajn.

VII

Forflugis ili. Kie lancarbaro
nun estas? Kie flagoj multnuancaj?
La fulmojn de l'armiloj
la sangaj nuboj kaŝas.
— Kiom da ili estas, knab', kalkulu
Vi bone — Dudek, deknaŭ, dekok, deksep,
eĉ deksex, dekkvin, dekkvar, dektri, dekdu,
dekunu, dek, naŭ, ok, sep, ses, kvin, kvar, tri,
du, unu... eĉ ne unu; ĉio finis.
Dommastro, kun la hund' al domo pajla
reiru, kaj edzinon kaj infanojn
amkisu. Lavu kaj en korno kapra
la sagojn gardu kaj sur ili dormu.
Vespere venos agloj la montaraj
bekfrapi je la membroj; sed la ostoj
en valo restos ĉiam blankiĝantaj.

Tradukis Amalia Nunez Dubus.

Hinda Ekzpozicio en la Mondpalaco Bruselo.

La Hinda Ekspozicio estis organizata de la «Ligue Pro-Hindoue» kaj la Mondpalaco.

Okaze de la malfermo la 12.-an de Novembro So. Paul Otlét bonvenigis la ĉeestantojn esprimante la jenajn pensojn: «La granda celo de la Mondpalaco estas konatigi la mondon kaj nenia homaĵo estas fremda al ĝi. Hindujo enhavas unu sesonon de la tuta homaro, lando de antikva civilizacio, klopodas solvi multe da problemoj kiuj havas internacian signifon, do ni nepre devas konatiĝi kun Hindujo. La direktoro de la Ligue Pro Hindoue sciigis, ke la celo de lia asocio estas konatigi la diversajn aspektojn de la Hinda vivo. S-ino Sindhwad salutis la kunvenon en la nomo de Hindujo. La kunigilo inter Mondpalaco kaj Hindujo

estas granda, ĉar ambaŭ valorigas la moralajn fortojn por konstrui plej bonan justan homan socion. La salutvortoj estis diritaj esperante, flandre kaj france. En la estintecan Fraŭlino Doktorino Corbiau kunportis niajn pensojn 3000 jaroj antaŭ J. Kr. Ŝi montris al ni per lumbildoj la elfosaĵojn de Mohen jo Daro, kiujn oni trovis antaŭ 10 jaroj laŭlonge de la rivero Indus. Ĉarme kaj simple Fraŭlino Doktorino Corbiau revivigis antaŭ ni la pasintecan de laborema, inteligenta, tre evoluciita popolo. Fine S-ro Vanine ĉarmis nin per la dolĉa, simpla tre delikata Hinda muziko. Per ludo sur violono kaj liuto kaj per kantoj li kaptis nian animon.

Lunde vespere la granda Hinda artisto el Baroda, S-ro Muŝeraf Khan, donis belegan koncerton. Siajn kantojn li akompanis per ludo sur la Hinda instrumento «Sitar». La artisto klarigis, ke la Hindoj preferas aŭskulti unu artiston aŭ kelkajn, sed ne multajn samtempe. La artisto tutsimple respiegulas animstacion de li kaj de la aŭdantoj. Ĉiu sono kvazaŭ parolas al ni kaj la simpleco, la delikateco de la Hinda muziko trankviligas nin, levas nian animon. Sinjorino Khan parolis al ni pri la filozofio «sufismo» Ŝi respektas ĉiun kredon kaj iu ajn sincera serĉanto de vereco estas «sufi-ano».

Jaude vespere estis dediĉata al la ekonomiaj kaj politikaj problemoj de Hindujo. La diversaj parolintoj montris la malbenitan influon de fremda administrado kaj ĉiuj kore deziras baldaŭan liberecon por Hindujo. Okaze de la esperanta parolado pri «Khadi» la 19-an de Novembro, Esperantistoj de ĉiuj Bruselaj grupoj kaj eĉ ne-Bruselanoj ĉeestis. Diversaj aŭskultantoj neesperantistoj esprimis deziron lerni Esperanton kaj aĉetis malgrandan lerno-libron. Kelkaj el ili multon komprenis el la parolado. «Khadi» estas la manfilita kaj manŝpinita ŝtofo kaj ludas gravan rolon en la ekonomia vivo de Hindujo. Anstataŭ eispezi monon eksterlande aĉetante fremdlandajn ŝtofojn, — pere de Khadi, la mono restas en la lando. Pere de revivigo de ŝpinrado Gandhiji donas laboron al la plej malriĉaj, plej mizeraj Hindaj familioj.

Sinjoro Paul Otlet fermis la Hindan semajnon. Dum ĝi ni lernis multe kaj kiel fervora pacamanto li deziras konstrui novan mondon en kiu la ekspluatado de individuoj de nacioj alihaŭtulaj ĉesas. Ĉiuj devas helpi kaj por bone kunlabori ni devas interkoniĝi kun ĉiuj popoloj, proksimaj kaj malproksimaj, en Afriko kaj Azio. Hindujo, lando de granda civilizacio havu sian urbon en la venonta Mondurbo!

Mi opinias, ke la Flandroj treege bone komprenas la ideojn, la problemojn diskutitajn aŭ prezentitajn dum la Hinda semajno. Ili ankaŭ amas la pacon, justecon kaj liberecon. Kvankam malgranda, la ekspozicio estis interesa kaj vidinda kaj bone instruis pri diversaj aspektoj de la Hinda vivo.

Erna Rieckmann-Sindhwa.

Respondo al la konfidenco

Delonge vi min amis,
kun varma simpati';
Mi tion jam suspektis,
sopiris nur al vi.

Kaj eĉ vi jam min kisis
sed nur en via rev';
ho, kiom feliĉigus
min vera la reviv'!

Sed plue vi ja pekis :
«Vi ofte volus pli!»
Rapide pentofaru
kaj geedziĝu ni!

Juul Karnas.

Tradicio

Instruisto lernas de lernanto,
ofte eĉ en tia granda kvanto,
ke tute infaniĝas li.
Iu klarigadis kun subtilo,
ke transira aĵo al la filo
de l'patro estas tradici',
frazon petis kun ĉi tiu vorto
kaj (atentu pri l'dirita sorto)
de bub'respndon citos mi :
(Ve, ankoraŭ ne saĝul'kun barbo)
«Dum mi grimpis sur tre alta arbo,
ŝiriĝis mia tradici'».

Tyneverum.

Dujara Ekzistado de la grupo « La Estonto » el Mechelen.

Okaze de la dua datreveno de la fondiĝo de nia grupo, la 22-an de decembro, ni fiere povas rigardi dorsen. Nur per kvin samideanoj, inter kiuj sin trovis nia nuna prezidanto, sekretario kaj vicsekretario, ni por la unua fojo kunvenis por fondi la grupon, starigi regularon kaj elekti nomon.

Kuraĝe ni organizis kurson en urba lernejo gvidita de nia senlaca samideano, nia nuna prezidanto Rainson.

La grupkunvenoj tamen suferis ĉar la kurso okazis de samantagon.

Je Pentekosto 1932 ni iris triope al la Kortrijka kongreso kaj akceptis organizi la 4-an Flandran Kongreson en nia Urbo.

Dum la sekvonta Vintro ni denove organizis kurson kaj havis multan laboron per la organizado de la kongreso.

Kun sukceso alia kurso okazis en la societo «Voor Eigen Schoon».

Nia malmultnombra grupo tamen povis prezenti malgrandan amuzan kantludon dum la kongrestagoj.

Tiu kongreso estis vera sukceso ankaŭ por nia grupa agado, la membronombro estis duobligata, sekve de la aliĝo de kelkaj lernantinoj de la kurso ĉe «Voor Eigen Schoon».

De tiu momento nia grupo vivis gaje kaj vigle kaj konstanta estraro estis elektita. La semajnaj kunsidoj bone estis ĉeestataj, ni organizis 11-an Julio-feston kaj promenadojn en la ĉirkaŭaĵo de Mechelen.

En oktobro ni komencis novan kurson, kiu tre sukcesis, kaj certe donos belajn fruktojn, kaj aliĝigos novajn membrojn al la grupo.

Ankaŭ ĉi tiun monaton ni eldonis nian «Informa bulteno» kiu de nun aperos regule por la loka agado kaj estos dissendata al ĉirkaŭ sesdek samideanoj, membroj kaj aliaj.

La krono sur nia ĝisnuna agado estas certe la malfermo de nova sidejo en la etaĝa salono de la urba biblioteko. La malferma kunsido kun parolado de eksterlanda samideanino vere sukcesis.

Tamen necesas nun ke niaj membroj pli multnombre ĉeestu la kunvenojn, ni devas ĉiam pliampleksigi nian pacan aferon, por ke por ĉiam la verdstela standardo flirtu super nia kara urbo.

P. V.

OOSTENDE, LA URBO DE NIA V-a



La Oostenda marbordo.

Ĉu vi jam aliĝis? La kotizo estas 12.00 fr.

Pagu tuj per poŝtĉeko n° 4071.03 de s-ano Marcel Troch, Plakkerstraat, 37, Oostende.

En proksima numero la provisoro programo.

El la Flandra Historio.

JACOB VAN ARTEVELDE

En la komenco de la centjara milito inter Francujo kaj Anglujo (1337) akra krizo estiĝis en la flandra drapindustrio, ĉar Eduardo III. la angla reĝo malpermesis la eksportadon de lano al la flandra graflando kaj la importadon de flandra drapo en Anglujon.

Intencante ĉesigi ĉi tiun krizon, la urbo Gent, en la persono de Jacob Van Artevelde, la ĉefa reprezentanto de la Gent-a politiko, interrilatis kun Anglujo, kun fina rezulto ke la franca kaj angla reĝoj interkonsentis pri la neŭtraleco de la graflando (1338).

La grafo Ludoviko de Nevers (aŭ «de Crécy») kiel feŭdulo de la franca reĝo Filipo de Valois, tamen ne povis malhelpi, ke liaj subuloj poste prenis partion por Anglujo. Post la forvojaĝo de l'grafo al Parizo, Jacob Van Artevelde, la ĉefgvidanto de tiu movado, regis de 1338 ĝis 1345 kiel veran diktatoron, certigante al sia urbo la hegemonion en la graflando kaj proklamigante de la flandraj urboj, Eduardon kiel reĝon de Francujo.

Tamen la Gent-a politiko malsukcesis pro la enviiemo kaj internaj kvereloj de la grandaj urboj. Van Artevelde, kiu ne sukcesis akiri la plenumon de certaj promesoj de la angla reĝo, mortis kiel viktimo de konspiro de l'teksistoj (Julio 1345).

La posteularo, reknante la grandan valoron de la «saĝa viro» starigis al li statuon sur la «Vendreda Placo» en la Artevelde urbo: Gent.

La personeco de Jacob Van Artevelde inspiris diversajn flandrajn romanverkistojn kaj poetojn, i.a. Hendrik Conscience (1) kaj Julius Vuylsteke. T.

La Maldekstra Flanko.

el «Tri Reĝoj - Triptiko» de F. Timmermans

Ree estis Krisnasko kaj la paŝtisto Suskewiet, kiu ĉiujare kun Pitjevogel kaj Schrobberbeeck, sin amuzis kiel la Tri Reĝoj, kaj trioje kun kartona stelo, kaj belaj malnovaj kantoj estis vizitintaj la farmobienojn, kuŝis nun malsana en lito, kun la ombro de la morto sur si. En la angulo, al la muro apogis la kolora, ligna stelo kaj pendis lada krono.

(1) Romano «Jacob Van Artevelde» — En «Paĝoj el la Flandra Literaturo» de Seynaeve kaj Van Melckebeke (1904) troviĝas traduko de sceno el tiu libro: la mortigo de Van Artevelde, parolanta al la ekscitita popolamaso de sur la balkono de sia domo.

Li kuŝis kie li ĉiam kuŝis, en la ŝafejo.

Tra malgranda fenestreto, apud la lito, li povis vidi la nekovritan malproksimaĵon, sur kiu la duonluno, kiel arĝenta bobeno, venis teksti la belan stelvestaĵon.

Estis la unua Kristnasko, dum kiu li ne povis kuniri kun siaj kamaradoj. Tiuj nun iris duope, kaj ankoraŭ ja ĉiam kantadis: «Ni estas Tri Reĝoj el Orient'».

Depost la miraklo de l'pasinta jaro, kiam ili dum sia rondirado alvenis en foirveturileto; tie trovis malriĉan viron kaj junan virinon kun ĵusnaskita infano; kaj tie pro neklarigebla impulso, kaj nekonnata respekto surgeniis kaj prezentis sian kolektitan monon kaj manĝaĵojn, depost tiam Suskewiet komencis alian vivon. Ĉar malkaŝe li sentis, ke tiu infaneto estis Dio, kiu ĉiujare kun Kristnasko por unu tago, ree venas en la mondon. Ha, li tiel bone rememoris, kiel ili vojerariĝis dum la sankta horo, vidis lumon sub la glacio, kvazaŭ lampojn, kaj aŭdis en la aero zumi la abeloj; kiom timemaj ili estis, kaj kia ĉiela dolĉeco lin kaj ankaŭ la aliajn kaptis, kiam ili ekvidis tiun infaneton, kaj kiamaniere ili propramove, sen interkonsento fordonis siajn malfacile akiritajn cendojn kaj manĝaĵojn.

Kaj ĉu ili ankaŭ ne aŭdis la malriĉan viron diri, kiam Pitjevogel demandis la vojon: «Tiam vi devas esti ĉi tie.» Certe tio estis la Sankta Familio. Li tion rakontis al la paroĥestro, sed tiun ĉi akompanis lin ĝis la pordo, kaj la pedelo malŝate diris, ke la ŝafisto estis nur trovitulo, kaj ke lia cerbo estis elfrostita.

Ĉie ajn, kie li rakontis, ke li vidis la Sanktan Familion, oni mokridis pri li, kaj eĉ liaj du kamaradoj iom forgesis, ili ja diris: «Estis strange, nu estis strange», sed ili ne plu sin okupis pri tio, kaj faris ĉiutage pli grandajn pekojn por havi monon kaj brandon.

Sed Suskewiet ŝanĝis sian vivon. Ĉiam ja estis arda fajrero da pieco en lia koro, sed nun ĝi kreskis ĝis blanka fajro, kiu lin metis en ĉiela ekstazo, kaj plenigis lin je belaj, dolĉaj sentoj, tiel ke li preskaŭ ne plu sciis ĉu li ja vere vivis.

Li malzorgis sian vivon kaj forgesis paŝti la ŝafojn.

Ĉe la kampkapeletoj li de tempo al tempo dum horoj surgeniis, kantadis, kaj recitis naivajn preĝojn.

Ankaŭ li pentofaris por forfroti siajn antaŭajn pekojn, kaj ne priatentis, kiam frostis, por truigi la glacipecojn kaj ekstari kun siaj nudaj piedoj en la suferiga malvarma akvo.

Kaj kiam li trenis sian laman kruron malantaŭ la ŝafaro, tiam li preĝis al sia rozario, — kaj kiam li kun kamparanoj parolis, tiam ne plu estis pri la vetero aŭ terpomoj sed pri Nia Sankta Virgulino, kaj la Infaneto Jesuo, kaj pri la profundeco de la peko.

La homoj, kiuj lin antaŭe nomis naiva, nun lin tute trovis stulta kaj klopodis lin eviti. Kion li rakontis estis bona por pastro, sed ne por iu, kiu estis samvestita kiel ili.

Kun granda deziro la maljuna Suskewiet atendis la novan Kristnaskon. Li ĉiam konservis la stelon, kaj renovigis ĝin ĉiujare. Nun ankaŭ li surgluis ĝin per kolora papero kaj kun ĉokolada arĝenta papero, kaj sur la pintoj li alfiksis orajn rozetojn, postres-

tiĉtaj de 50-jara edzjubileo. Ankaŭ li ne plu surmetus la cilindron, ĉar li ĉe la ladisto forigis trovitan ladpecon je kombilkrono. Tio estus por li multe pli bela. Li sin okupis pri tio, kiam la amikoj venis unufoje vidi, ĉar ili aŭdis, ke ankaŭ tri aliaj reĝoj estus elirontaj, kaj tiuj havis stelon kun sonoriletoj, kaj sekve do gajnus pli multe da cendoj.

Sed Suskewiet ilin malfide rigardis kaj diris: «Mi nur kuniras kun la stelo, se ni la monon kaj la manĝaĵon, kiuj ni rikoltas, donos al la malriĉuloj.»

«Ĉu vi estas stulta?» kriis Pitjevogel la angilkaptisto.

«Ĉu ni ne sufiĉe malriĉaj estas?» demandis la almozulo Schrobberbeek kun siaj puŝaj okuloj.

«Ne», diris Suskewiet, «vi devas doni ĉion al Dio, kaj se vi donas tion al malriĉaj homoj, aŭ al Dio, tio estas ĝala.»

«Tiam ni restas hejme», diris Schrobberbeek; «aŭ ĉu vi pensas, ke mi por aliulo kantos el ĉiuj fortoj. Tio estas ja bona por anu fojo!»

«Mi pli bone ĝin scias», diris la sagaca Pitjevogel, «ni mem faros stelon, aŭ ĉu vi pensas, ke ni ne kapablas tion! bonan tagon, stulta Sus!»

«Agu laŭplaĉe», kriis la paŝtisto post ili, «sed kun tiu stelo, kun kiu ni trovis Dion, vi ne kolektos monon por peki!»

La ĉielo muelis la unuan neĝon super la teron, kaj ĉiela felĉego trafluis Suskewiet. Li sole nun de farmodono al farmodono iradis por amasigi monon por la malriĉuloj.

La farmistoj iom restis ĉe li, sed dum lia ekdormo reifingroj.

Sed Suskewiet malsaniĝis kaj ne plu kapablis forlasi sian litaĉon.

Kristnasko venis. La paŝtisto ricevis la lastajn sakramentojn. Li vidis veni kaj foriri la paroĥestron kun sia ora surpliso. Vesperiĝis kaj la luno venis rigardi la blankan mondon.

La larmoj fluis sur la rigidaj haraj vangoj de Suskewiet, ĉar li por la malriĉuloj ne povis festi Kristnaskon.

Dum tridekkvar jaroj la stelo aŭdis liajn kantojn. Nun venis la morto sur lin. Lia koro preskaŭ ne plu vivis, sed lia malmulta spirito, de tempo al tempo, klare fajris.

La farmistoj iom restis ĉe li, sed dum lia ekdormo reiris domon, kie lumiĝis la Kristnaskarbo, kaj estis bakataj la vafloj. Li kompate aŭdis ilian ĝojan bruon; oni ludis klarineton, kaj resonis kantoj.

Li ne plu vivus du horojn, kaj li petegis la ĉielon lasi ankoraŭ pasi la Sanktan Horon.

Lia malgrasa kaviĝinta kapo kuŝis kline, kaj tiel li alternative povis vidi la lunon sur la ĉielo, kaj la stelon, kiu brilis en la angulo. Liaj manoj kuŝis nekovrite, grandaj kaj maldikaj, kun stumpaj fingroj.

Kiel li perdis en la mondon venis, kiel trovitulo, li solece kaj forlasi mortus. Nur la bonaj ŝafoj restis kun li, kaj venis de tempo al tempo vidi super la barilo.

Pli alten leviĝis la luno, iĝis pli malgranda dum leviĝado kaj pli pura pro arĝentumo.

Suskewiet preĝadis el ĉiuj fortoj, por ankoraŭ unu fojon travivi la favoron de Kristnasko.

Tiamaniere li longtempe tie kuŝis. Finè li ĉi tie kaj tie vidis apud la muelilo kapvestitajn virinojn, kun lanterno, direktiĝi al la vilaĝo. La bruo en la farmodomo ĉesis.

Tomete pli malfrue li aŭdis la sonorilojn kaj la ludon de orgeno.

Komence li tion ne kredis; la preĝejo tamen estis malproksime je tri kvaronhoroj! Sed ne estis iluzio, orgeno estis ludata.

Ravaj, treniĝaj, kantaĵ tonoj, kiuj malrapide kaj solene, malferme balancadis, ŝvelantaj de emocio kaj alta ekstazo. Tian belajon li estis neniam aŭdinta. Antaŭ ol reveni de sia miro, li aŭdis subite, ke ĉiuj ŝafoj ekblekis. kaj en la lunlumo, li vidis, ke ili direktis la kapojn orienten.

«Tio estas la Sankta Horo!» murmuris Suskewiet, malvarmiĝinte pro ekstazo.

«Dio! Dio! Mia stelo!» Li provis sin rektigi por ellitiĝi kaj preni la stelon, sed ne iris.

«Mia stelo!» Li malespere kunigis ĉiujn siajn fortojn, puŝis per siaj piedoj la litkovraĵojn kontraŭ la flankojn de la lito, kaj tiam sin rektigis per la elstreĉitaj littukoj. Raŭka tusado surprizis lin, kaj post tio, kiam la ŝvito riveretis sur sia frunto, li pli antaŭen venis, elmetis siajn malgrasajn kruojn el la lito, ree tusadis, sed nun ne plu atendis ĝis kiam tio finiĝis. Li rekte staris sin apogis kontraŭ la muro, kaj paŝeton post paŝeto li iris kun fleksigantaj genuoj al la stelo. Finfine li ree eksidis sur la lito kun la lada krono sur la kapo kaj kun la brakoj.

Kaj post ripozado, li prenis la ŝnureton kaj rigardante en la lunnokto li kantis, raŭkte kaj rompите, akompanita per la dolĉaj kantoj de la ne konata orgeno:

Ni estas tri Reĝoj el Orient'
Gvidataj de stel' al firmament'.
Ni ĉie ja serĉis en la mond'.
Tra la kampoj kaj sur mont',
Kaj kie haltis stel' en val'.
Ni ĉiuj alvenis al la stal'.

La larmoj gutetis de liaj vangoj, tremetoj traskuis lian korpon, kaj en liaj refraktantaj okuloj de tempo al tempo, fulmis la fajro de lia ekstazia animo.

Sed kiu aŭ kio estis tio, tie malproksime?

Kernpura lumo, kiu sur la de la luno heligita neĝo, pli kaj pli proksimen glitis, rekte antaŭen, ne priatentante barilojn aŭ vojojn.

Suskewiet surprizita entenis sian spiron, sed mekanike tiradis la ŝnureton, kaj la stelo kraketante alterne turniĝis.

Pli kaj pli ĝi alproksimiĝis. Finfine ŝajnis esti tre malgranda infaneto en blanka ĉemizeto kun piedetoj nudaj; ĝi portis terglobeton en sia mano, kaj ĉirkaŭ ĝia bluokula ĉarma vizaĝeto, kaj ĝiaj oraj krispharoj, radiis ĉielarka aŭrorbrilo.

«Kiu estas tio?» murmuris Suskewiet, «ŝajnas al mi, ke mi

ankoraŭ vidis tiun bubeton.»

Ĝi rekte venis al li, momente malaperis sub la fenestreto, kaj tiam malfermiĝis la pordo, kaj antaŭ li staris la infaneto, tiel freŝa kaj pure kiel kratagfloreto.

La stalo subite odoris je ĝardeno plena de rozoj.

«Bonan tagon, Suskewiet», diris ridetante kaj konfide la infaneto, «ĉar vi ne povas veni al mi, mi venas al vi. Ĉu vi min ankoraŭ konas?»

Kaj sur la vizaĝo de Suskewiet radiis la gaja surprizo, kaj ridete vidigis liajn dupecajn nigrajn dentojn. Li ride kapjesis, sed ne scipovis eligi ian vorton pro kortuŝo, kaj dume pendis la larmoj ĉe la rudaj haroj de liaj vangoj.

«Jes?» diris la infaneto. «Ĉu vi volas tiam daŭriĝi vian kanton. Mi ja tiom ŝatas ĝin aŭdi.»

Kaj Suskewiet kun sankta respekto prenis la ŝnureton, kaj kantis, dum liaj okuloj plenaj de beata fajro, radiis en la roza brilo:

Kaj tuj Maria pro la bru'
Jam sopiris de ektim',
Ĉar ŝi pensis: Herodes, jen,
Venas por kapti Jesueton.
Ŝi pensis: jen la kruelul'
Venas por l'etul'.

Kaj vidu, la nigra pomarbo, kiu tie ekstere staris, ne estis blanka je neĝo, sed blanka de riĉegaj pomfloroj.

Kaj tie, rigardis la ŝafoj super la barilo, kaj la posteaj apogis sur la dorsoj de la antaŭaj.

«Venu,» diris la infaneto, «ĉu vi kuniras al nia hejmo?»

«Ho jes, jes!» ridetis Suskewiet. Subite li estis kvazaŭ sanigita. Li volis meti sian pantalonon, sed li spertis ke ne estis tiel malvarme, kaj krom tio li ne havis tempon.

Li prenis la stelon, sekvis la infanon, la kolorbrilan infanon. Sed li ankoraŭ sin turnis al siaj ŝafoj, kiuj tiel kompateme blekis.

«Ĉu tiuj ne povas kuniri?» li demandis, «mi estas ŝafisto.»

«Ju pli multaj, des pli bone!» respondis la infano.

«Nu venu, karuloj, venu!»

Suskewiet malfermis la barilon, kaj ĉiuj sekvis, en densa amaso. Kaj tie ili iris en la argenta, blanka nokto. La infaneto iris kun sia malgranda mola maneto en la granda mano de la ŝafisto, kaj kondukis la maljunulon tra la netrairita neĝo. Li portis stelon, kiu radiis en la lunbrilo, kaj malantaŭ li venis la ŝafoj, kun la kapoj malsupren pro respekto.

«Tie estas!» diris la infaneto, montrante la malproksimaĵon, kie ora palaco, super ĝardeno en printempflorado, montris kupolojn kaj pintturetojn.

«Bele, bele!» diris Suskewiet en ekstazo, kaj malantaŭen rigardante al la ŝafoj: «Tie la herbo ja estos ankoraŭ multe pli bona, ĉu ne, karuloj?»

Kaj tiam ili eniris.

Schrobberbeeck kaj Pitjevogel revenis de sia dureĝa ekskurso.

Ili estis ebriaj pro la multaj glasoj da brando, kiujn ili dumvoje trinkis. Ili krono staris malrekte sur la kapo, kaj la stelo estis rompiĝinta. Ili ŝanceliris brakon en brako kaj kantis maldecajn kantojn. Ili vojo pasis laŭ la farmobieno.

«Ho,» kriis Pitjevogel, «ni baldaŭ tintigos antaŭ li nian monon. Ne donu al li nian stelon!»

Kaj kiam ili tra la fenestreto rigardis, ili vidis Suskewiet en lia ĉemizo morta kuŝanta sur la lito, la lada krono sur la kapo. Kaj la du homoj tute konfuzaj, forkuris, forlasintaj la frakasitan stelon.

La sekvantan tagon oni trovis Suskewiet; ĉiuj ŝafoj paŝtadis malproksime en la kampo.

En la stalo, odoris je rozoj.

El la flandra tradukis

Ĉiuj rajtoj rezervataj kun la afabla permeso de la aŭtoro :
E. PAESMANS.

Diversaj sciigoj

Ontwikkeling Humor Ontspanning. De junio 1933, la redakcio de tiu ArnHEMA gazeto regule enpresigas kelkkolonajn artikolojn, parte nederlande, aliparte Esperante.

La interesatoj povas peti specimenon, gratulante la redakcion de «ArnHEMA Gazeto», Koningstraat 14, Arnhem, Nederlando.

La Kritika Observanto. Revuo politika kaj kultura. Por ĝin prezenti ni ĉerpas tion el la deklaro publikigita sur la unua numero: «**La Kritika Observanto**» celas utiligi sin por la progreso de la tutmonda laborista movado por la lojala kaj objektiva kritiko pri la bazoj kaj taktikoj de la diverstendencaj laboristaj organizoj; ĝi konsideras la unuigon de la tutmonda proletariaro, manlabora kaj intelekta, kiel antaŭkondiĉon de ĉiu plua progreso en la direkto de plena emancipiĝo el la ekspluatista jugo.»

Tiu revuo aperas kvaronjare kaj kostas 1 fr. fr., Sentier de la Sablonnière, 6 Malakoff, Seine, Francujo.

Internacia Pedagogia Revuo

Jam aperas dum pli ol 10 jaroj,

raportas pri internacia scienca pedagogio,

pri kongresoj kaj laboroj de la internaciaj instruistaj asocioj,

pri lernejo kaj instruistaro diverslandaj,

pri esp. en lernejo kaj instruistaro,

peradas interkorespondon por instruisto kaj lernanto,

estas organo de **Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE)**. Jarabono por 6 kajeroj kostas (inkluzive aneco de TAGE): 2,50 nederl. guldenoj.

Abonon kaj artikolojn sendu al la administranto P. KORTE, Schoolstraat 13, **Veendam** (Nederlando).

«**Hindujo**» Nova revuo. Aperas ĉiu trimonate. En la unua numero ni legas i.a. la 11 postulojn de Mathama Gandhi. Redaktorino estas s-ino Erna Sindhwad. Rue Vanderkindere, 37. Uccle-Abonprezo 8.— fr. jare Poŝtĉeko n° 970.49.

Milito al la milito.

Kiam patrino aŭdas pri milito, ŝi ploras: Mia infano.

Kiam patro legas pri milito, li pensas: Mia filo.

Kiam la filo iras en milito, li tremas: Mia vivo.

Kaj ĉiuj al si demandas: «Pro Kio?»

La patrino rezignas; la patro silentas; la filo mortas!

PRO KIO? Vi, homoj respondas: «Por kelkaj centoj da sinjoroj,

kiuj regas la mondon» Ili postulas vian korpon, vian vivon.

Ili posedas forton, kiun ili de vi ricevas.

Ĉu ankoraŭ ni ebligos tion? Ni ĉiuj respondu: «Neniam plu milito».

Nekrologo

La 6-an de Decembro mortis en Leuven S-ro Marron, bopatro de s-ro Calloens, prezidanto de Flandra Ligo Esperantista. Sincerajn kondolencojn al la ŝatata pioniro de nia movado.

Aforismoj.

de Dirk Coster.

1. La bona konscienco estas la natura rideto de l'kvieta animo.
2. Nur tiuj momentoj staras radiante en la plej alta memoro, dum kiuj la homo, ĉu en doloro, ĉu en ĝojo, la mondon belan povis vidi.
3. La beleco estas interna lumo, kiu de el la animo, tra la medio de l'karnaj okuloj, disfluas sur la mondo.
4. Kiam la animo sin tenas pure, tiam ĝi per tio devigas la vivon, doni al ĝi feliĉon.
5. En la rondo de al li donita nombro da vivojaroj, la homo povas esti kelkfoje juna, esti mezaĝa kaj iĝi maljuna.
6. En ĉiu el la tri vivostatoj, en kiu li povas vivi, la homo estas protektata per laboro kontraŭ la danĝeroj de tiuj vivostatoj: se la homo ne havas feliĉon, ĝi malebligas al li dubi; se la homo atendas feliĉon, ĝi malebligas al li konsumiĝi pro senfrukta atendado, kaj se la homo havas feliĉon, ĝi malebligas al li laciĝi.
7. Kio donas al falsa laŭdo kaj falsa mallaŭdo tiom da influo sur

la homo, estas la fakto, ke li sekrete jam aljuĝis al si pli da bono, aŭ kulpigis sin pri pli da malbono, ol aliaj iam povas fari al li.

8. Ĉiu centjar-malnova ideo iĝas ree nova je l'sama momento, kiam la tempo ĝin bezonas.

(el : «Marginalia»)

Tradukis Martha Vervloet.

Inter Ni.

BRUSSEL : N.E.L.E — La gaja vespero kiu okazis en nia ejo, la 12-an de decembro, bonege sukcesis. Multnombre ĉeestis la anoj de nia grupo kaj la lernantoj de nia kurso, kiuj plej agrable interkonatiĝis. Muziko kaj kantado alternis kun gajaj ludoj. Dum mallonga paŭzo s-ano Loeckx, **lernanto** de nia kurso, surprizis nin per simpla sed jam flua Esperanta paroladeto kaj per tio li pruvis la facilecon de nia lingvo. Nia amiko H. Rainson ankaŭ surprizis nin per ĉarma violonĉelludo, dume la estiminda edzino de nia simpata prezicanto regalis la ĉeestantojn per bonegaj tortoj, kiuj vere atestis pri la «bakarto» de nia prezidantino! Unuvorte : Vespero kiu agrable restos en la memoro.

LICHTERVELDE : S-ro Kamiel Feryn kreis en sia urbeto novan agadlokon esperantistan. Sekve al la diversaj propagandaj artikoloj en loka semajna gazeto estis organizata la 15-an de Novembro la unua kunveno. Malgraŭ la malbona vetero kunigis en la bonaspekta salono de la Katolika Laborista Domo 30 personoj. S-ro Delfortrie, lernejestro, trafe enkondukis la ĉeestantojn en la movadon; finante, li konsilis ilin nepre studi Esperanton. Sekvis la enkonduka leciono de la kursgvidanto, s-ano Honoré Brae-kevelt el Roeselare.

OUDENAARDE : Al Paco. — Kelkaj membroj regule kunvenas ĉiusemajne en nia ejo. Je la fino de Decembro okazos vespermanĝo! ĝi estos la tutunua kaj pri kiu oni raportos en sekvonta numero.

RONSE : La Paca Stelo. — Ni invitas ĉiujn membrojn kaj novajn gekursanojn ĉeesti la **devidan ĝeneralan kunvenon**, kiu okazos la 17-an de Januaro en «Concordia» Kiel kutime la fasadflago flirtos je la eniro de la kunvenejo. Interesa kaj grava tagordo. Ni atendas grandan ĉeestantaron por montri al la eksteruloj nian ĉiam pligrandigantan forton. En ĉiuj lokaj ĵurnaloj, la prezidanto aperigis artikolon pri la sukceso de nia lingvo ĉe la Brazilia poŝto.

ROESELARE : Ruselara Esperantista Grupo. — La amuza karaktero de la kunvenoj de la lastaj monatoj treege influis la regulan vizitadon. Samtempe ni konstatis, ke la progresintaj gemembroj iĝis la vivkerno de nia R. E. G. La 12-an de novembro, s-ano Debrouwere parolis je la malfermo de la kursoj por komen-cantoj. Ni konkludas, ke iom post iom la Esperanto-grupo vekas konstantan intereson en la Ruselara regiono.